


CERBE kaj KORE



**KULTURĀ SUPLEMENTO
AL LA REVUO "PONTO" N-RO 114**

N-RO 16 (84), SEPTEMBRO 2020

Enhavo

Gratuloj al gajnintoj de Belartaj Konkursoj

V. Opletajev kaj E. Georgiev 3

Originala poezio

Espopore. Sur la pint’ de poezi’ 3

In memoriam

Maria Prilepskaja 5

Tradukita poezio

Konstantin Simonov. Generalo. Trad. Maria Prilepskaja 4

Eventoj de la rusa kulturo

Forpasis Vladislav Krapivin 6

Tradukita poezio

Vladislav Krapivin. Trad. Aleksandro Mitin

Blua krabo 6

La kanto el la novelo “Lulkanto por la frato” 7

Matena vento 8

La kanto el la romano “Gruido kaj fulmoj” 9

“Ree akra alarm’...” (Rufa ĉevalo) 10

125 jariĝo de Sergej Jesenin (1895-1925) (teksto de L. Novikova)

Tradukita poezio

Sergej Jesenin. Trad. Ludmila Novikova 11

Betulo 12

Hoj Rusio vi, patrino... 12

Trans fenestro luno... 13

Ĉiuj ni foriras senevite... 13

Bruladu mia stel’ kun brilo... 14

140 jariĝo de Aleksandr Grin (1880-1932)

Tradukita poezio

Trans river’ en roza lumo... Trad. Ludmila Novikova 15

Kanto de maristoj el novelo “Ŝipoj en Liss”. Trad. Jurij Finkel 16

Originala poezio

Klara Ilutoviĉ. Al jubileo de la Rusa geografia societo 17

Tradukita poezio

Mihail Lomonosov. Vespera meditado pri Dia potenco dum la superba arkta lumo Rusigis L. Novikova 18

Rememoroj

Vladimir Samodaj. En Jemeno 20

Historio

Tatjana Auderskaja. Esperanto en Odesa universitato 39

Humuro

Aleksandro Mitin. Polisinteza 44

Gratuloj al gajnintoj de Belartaj konkursoj

Laŭ informo de UEA (Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 903, 2020-09-06), dimanĉe la 6-an de julio, kadre de la Monda Festivalo de



Esperanto (MondaFest' 2020), en bunta kaj elstare kunmetita virtuala festo-ceremonio, la Komisiono pri Belartaj Konkursoj de UEA diskonigis la rezultojn ĉijarajn. Miguel Gutiérrez Adúriz, Sekretario de la Belartaj Konkursoj, bonvenigis la spektantojn kaj anoncis, ke la konkurson partoprenis 151 verkoj el Afriko, Azio, Eŭropo kaj Ameriko.

Evidentiĝis, ke gravajn premiojn ricevis du el konstantaj aŭtoroj de “Cerbe kaj kore”. En la branĉo “Prozo”, kiun partopranis 27 verkoj de 18 aŭtoroj el 16 landoj, la unuan premion ricevis **Vladimir Opletajev el Surguto**, kio pruvas, ke li estas ne nur elstara instruisto kaj movada aktivulo, sed bonega originala verkisto en nia lingvo. (Cetere, kun lia esperantlingva originala prozaĵo oni povas konatiĝi laŭ lia rakonto “La reveno” en CkK *CkK 13, p.15*).



En la branĉo “Poezio” la duan premion pro poemo “Ek sor” ricevis **Evgenij Georgiev (Espopore), el Karagandao**, Kazahio. Liaj verkoj plurfoje aperadis sur paĝoj de nia revuo, sube legu lian novan poemon.

Gratulojn al niaj majstroj!

Originala poezio

Sur la pint' de poezi'

Espopore

Mi ebrigas... Esperanto lulas.
Buŝ' mia, kiel iu fabela font',
Salivon ravan naskas. Kaj ĝi fluas...
Ne por la samtempulo, por estont'.

Kaj aĉa kaĉo el la vortoj densas.
Radikoj miaj dronas en ĥaos'
De bakanal' sen rimo, ritmo, senco,
Pikante per monstreco ĝis la ost'.

Memoro mia feblas, sed ja eblas
Eĉ nun reveni al tiu ĉi vizi':
Mi, kiel brut', senmovas kaj plenmeblas,
Sed ĝojas sur la pint' de poezi' ...



In memoriam

La 1-an de septembro forpasis unu el la plej aktivaj esperantistoj de la urbo Samaro **Maria Prilepskaja** (1947-2020). La nekrologan artikolon pri ŝi legu en “Ponto” n-ro 114. Menciindas, ke krom diversaj instruaj, historiaj kaj politikaj aktivecoj, pri kiuj ŝi famiĝis inter esperantistoj, estis ankaŭ beletro. En REGo (Rusia Esperanto-gazeto) № 40, junio de 2007-a jaro, estis publikigita Esperanta traduko de la versaĵo «Generalo» de Konstantin Simonov. La versaĵo estas dediĉita al la granda hungara internaciisto kaj verkisto Mate Zalka, kiu pereis en Hispanio ĉe la urbo Ueska dum la Hispana civila milito. La versaĵon esperantigis Maria Prilepskaja. Honore al ŝia memoro ni represas la tradukon.

Tradukita poezio

Konstantin Simonov

Generalo

Memore al Mate Zalka

En montoj ĉi-nokte ne varmas.
Tre laca pro tag-esplorad’
Li sidas ĉe flava fajreto,
Li pensas – eterna soldat’.
 La kruĉo kun kafo brubolas,
 Dormegas la militistar’,
 Ĉiele de laŭr’ aragona
 Susuras sen ĉes’ foliar’.
Sed ŝajnas, li aŭdas ne laŭron –
Aŭdiĝas susur’ de tili’,
La arbo amata kaj kara
De lia hungara patri’.
 Li lasis delonge Patrujon –
 Lin kaptis militmuelej’,
 Li trovis sin en Siberio,
 En fora militkoncentrej’.
Fariĝis li jam komunisto,
Batalis por ruĝa Rusi’,
Sed jen okcidenten hungarojn
La trajn’ tiris al Hungari’.
 Li en Budapeŝton revenis.

Por kio? Por nova luktad'?
 Por plori? Por dentojn kunpremi
 Kaj ree – fremdlanden kurad'?
 Ĉi venon li eĉ ne atentis
 Gardante Patrion en kor',
 Li scias ke devas reveni
 Al hejmo por ĉiam el for'.
 Li daŭras tutmonde batali:
 En Hamburg lin kovris bombad',
 Lin konis Ĉapej', en Ĥarama
 Pri li estis la parolad'.
 Li lasis delonge Patrujon,
 Sed estis dum vojoj en kor'
 Hungaraj ĉielo kaj tero,
 Pri lando lasita memor'.
 La ruĝa standardo hungara
 Prilumas lin dum batalad'.
 Li por Hungario luktadas –
 Ne gravas la lok' de luktad'.
 Al mi oni diris en Moskvo
 Ke dum ĉe Ueska batal'
 Pro de Germani' obusero
 Pereis en kamp' general'.
 Sed tamen mi kredas neniun:
 Batal' – lia devo kaj sort',
 Kaj en Budapeŝton reveni
 Li devas ja antaŭ la mort'.
 Kaj dum la hispanan ĉielon'
 Trapikas germana birdar',
 Ne kredu: li vivas. Leteroj
 Mensogas, ne veras famar'.
 Troviĝas li nun – ĉe Ueska,
 Dormegas la militistar',
 Ĉiele de laŭr' aragona
 Susuras sen ĉes' foliar'.
 Sed ŝajnas, li aŭdas ne laŭron –
 Aŭdiĝas susur' de tili',
 La arbo amata kaj kara
 De lia hungara patri'.

Traduko de Marija Prilepskaja

Eventoj de la rusa kulturo



Forpasis Vladislav Krapivin

La 1-an de septembro en Jekaterinburgo forpasis Vladislav Petroviĉ KRAPIVIN (1938—2020), fama ruslingva poradoleska verkisto, kies verkoj estas tradukitaj en multajn lingvojn de la mondo. Bedaŭrinde, Esperantujo ankoraŭ atendas tradukojn de liaj noveloj kaj romanoj.

Eble, poemoj de Krapivin estas ne tiom famaj, kiom estas la noveloj, tamen ankaŭ ili estas atentindaj. Iuj aperis kiel parto de novelo, la aliaj estis verkitaj

precipe por la infana kolektivo «Каравелла» ("Karavelo"), kies fondinto kaj gvidanto ("komandoro") estis la verkisto dum longa tempo. Al pluraj el ili ankaŭ estis komponita muziko, do ili jam estas kantoj.

Vi povas legi kelkajn de ili, tradukitajn en Esperanton de Aleksandro Mitin.

Tradukita poezio **Vladislav Krapivin**

Blua krabo

(la kanto el la romano "La knabo kun spado")

Blua krab', blua krab'
El fabela songa mond',
Blua krab' inter borda ŝtonamas'...
Jen ok kruroj, jen kap',
Du pinĉiloj en la front',
Kaj arĝentaj steloj brilas sur kiras'.

Fiŝkaptisto kun ret',
Balenisto kun harpun'
Okupiĝas de aŭror' kaj ĝis aŭror'.
Sed pro tiu obsed'
Ĉion mi forgesis nun,
Serĉas golfon kun la krabo kun fervor'.

— Kial revas vi ĝin?
Ĉu ne estas abomen'?'
Kial ekis tiom stranga via vol'?'
Kiel aĉas la mien'!
Ĉu ĝi plenas je venen'?'
Nek kuiru ĝin, nek teni en skatol'.

— Sed mi serĉos sen fin',
Revos eble dum jarcent',

Naĝos mi kun sopiro en la kor'.
Volas vidi mi ĝin,
Nu, almenaŭ dum moment',
Vidi kaj tuj permesi rampi for.

La kanto el la novelo "Lulkanto por la frato"

Kverelintoj, paciĝu,
Bagatelojn forgesu,
Flanke sakojn forlasu —
Venis grava moment'.
Diru pri plej precipa,
Se ne finis, sukcesu.
Antaŭ voj' por ni restas
Duonhor' da silent'.

Malhelbluaj pro tondro,
Kun pluvegoj koleraj,
Super herboj silentaj
Nuboj flugas kun mok'.
Kiel vejnoj pro sango,
Ŝvelas fulmoj inferaj.
Sed la tondro ankoraŭ
Foras de nia lok'.

Fumo kovras vastaĵojn
Pro purpura brulado,
Sed de tondroj kaj pafoj
Dume daŭras atend'.
Ĝis atako, ĝis sturmo,
Ĝis tondreg', ĝis invado
Por ni restas solsole
La minut' da silent'.

Ĝis atako, ĝis sturmo,
Ĝis provado de juro,
Eblas, ke ĝis la pafoj,
Ĝis plej lasta paŝet' —
La minut' por espero,
La minut' por despero,
La minut' por decido,
La sekund' por sinjet'!

Ekbruegis, ektondris!
Krevis tuj firmamento.
Sed ne fulmo ekfrapis,
Nek kanon' trafis nin.

Tamburistoj ekstaris
Super herb' en momento.
Klaras nun: ni transiros!
Tio estas ne fin'.

Matena vento

Forpelos dormon vento-vagabond',
Laŭ vento etendiĝos nia flago,
Stajveloj streĉos stajojn, kaj sur ond'
Sonora korpo flugos super lago.
Forlasu tuj vantaĵojn sur la bord' —
Vi respondecas pri stiril' kaj velo.
Jam levas vin kun tuta sia fort'
La vento, vekiganta en ĉielo.

Vi povas ŝati ventojn kun tener'
Kaj povas kontraŭ ili triste plendi,
Sed vento ne perfidos en koler',
Nek celos iun trompi aŭ ofendi.
Ĉar unusola estas ĝia cel' —
Ekflugi super mondo kun insisto!
Kaj unuigi venton kun la vel' —
Jen estas ĉefa arto de stiristo.

Do blovu gajaj ventoj kun fervor'
Kaj flugu ĉirkaŭ tuta granda Tero!
Kaj tiu leviĝanta kun aŭror'
Nin vokas al feliĉo kaj somero.
Ĝi iĝas tre aŭdaca en moment',
Bumŝkotojn ĝi etendis, kvazaŭ kordojn.
Kaj, ŝprucojn disĵetinte laŭ la vent',
La ĉielarko kombas ondajn hordojn.

Sin ĵetas la ŝipeto sen erar'
Sur la kontraŭan ondon kun akcelo.
Brusone kantas streĉa rigilar'
Per basa kordo de violonĉelo.
Nun antaŭ vi ŝanĝiĝas la real',
Ĉar akvo terajn leĝojn ne toleras.
Do tenu sin, amik'. Ja dum skual',
Vi scias, ŝanĝi halson tro danĝeras.

La kanto el la romano "Gruido kaj fulmoj"

Se subite ŝajnos
Tuta nia mondo
Enuiga, stulta
Ĝis turment',
Rememoru tuj vi, ke
Post la horizonto
Velojn sur la ŝipo
Taŭzas vent'.

Spertaj kapitanoj
Super maraj mapoj
Fumis, disputante
Ĝis maten'.
Poste de hakiloj
Ekaŭdiĝis frapoj,
Kreskis ĉe la maro
La karen'.

Kreskis la ŝipeto,
En la ŝipfarejo,
Lanĉis ni sur akvon ĝin
Je la ĝusta hor'.
Poste ni distreĉis
Velojn sur la rejoj.
Kaj ekstremis la kompas',
Kvazaŭ kor'.

Sub varmega suno,
Sub mallumaj nuboj,
Forlasinte klingojn
Sur la pob',
Sub velar' vetkuras ni
Kun delfenaj grupoj,
Mevoj kaj flugfiŝoj laŭ
La terglob'.

Ĉe l' peron', ĉe l' benko
Tedas vin malvasto —
Herbo kaj kokinoj en
Ordinar'.
Iru sur ferdekon do,
Grimpu al topmasto,
Kaj insulojn vidu vi
En la mar'.

“Ree akra alarm’...” (Rufa ĉevalo)

Ree akra alarm’
Batas, kvazaŭ obuso,
Ree ŝiras silenton
Trumpetistoj sur plac’.
Super fuma sunfalo
Pendiĝas Venuso —
La signala raketo
De l’ nokta minac’.

Rufas mia ĉeval’
Eĉ en tarda vespero,
Bruligita per fajroj
De flamanta ĉiel’.
Ĵus la hufo ekbatis —
Vigle ŝprucas fajreroj,
Kaj forportas ĝi min
Al severa fabel’.¹

Venis tiu fabel’
Kun la marŝ’ ardanima —
La lulkant’ kun la ritmo
De galopa ĉeval’.
La fabel’ al infano
Helpas iĝi sentima,
Por adolto ĝi gravas
Sen kial’ ... Sen kial’ ...

*Flugas, kvazaŭ standard’,
De la sun’ ruĝaj aloj,
Hufoj ŝiras orbitojn
En kurada pasi’.
Preter kosmaj dezertoj
Hastas stelaj ĉevaloj...
Kial estas mi nun
Ne kun vi, ne kun vi.²*



Elrusigoj de Aleksandro Mitin

¹ Laŭ la novelo, dua strofo devus esti la refreno, tamen en la reala varianto de kanto la refreno ne ekzistas.

² La lasta strofo estas en la novelo, tamen kutime ne trafas la kanton. Anstataŭ ĝi ripetiĝas la unua.

Eventoj de la rusa kulturo

125 jariĝo de Sergej Jesenin (1895-1925)



Sergej Aleksandroviĉ Jesenin (21.09.1895 – 28.12.1925) estas unu el la plej grandaj rusaj poetoj. Li naskiĝis la 3-an de oktobro 1895 en la vilaĝo Konstantinovo de la Rjazanja gubernio. Post fino de lernejo en 1912 Jesenin translokiĝis en Moskvon. Post unu jaro, en 1913, Jesenin verkis sian unuan pulikigitan versaĵon “**Betulo**”, kiu aperis en 1914 en la infana gazeto “Mondeto”. La poemeto reflektas rememoron de Jesenin pri sia infanaĝo en la vilaĝo, kie apud lia domo kreskis bela betulo. Tiu ĉi betulo de Jesenin iĝis poste krestomatia simbolo de beleco de la rusia naturo. Poezio de Jesenin estas tre patriotisma kaj unu el la plej karakteraj ĉi rilate estas lia poemo “**Hoj, Rusio vi, patrino**”.

Jam en siaj unuaj verslibroj de la jaroj 1916-1918 Jesenin montris sin kiel subtila lirikisto, majstra pentristo de la naturo, profunde komprenanta kaj amanta la rusan popolon, ties animon, kutimojn kaj lingvon.

Por la lirikaj poeziaĵoj de Jesenin estis kreita granda kvanto de kantoj kaj romancoj, kiujn plenumis kaj nun plenumas la plej famaj kantistoj kaj aktoroj. Unu el tiuj kantoj estas “**Trans fenestro – luno**”.

“Mia liriko, – skribis foje Jesenin, – vivas per unu granda amo – amo al la patrolando. Sento de la naskiĝtero estas ĉefa en mia kreado”.

La vivo de Jesenin ne estis glata. Translokiĝinte el la vilaĝo en la urbegon, li ne sukcesis adaptiĝi al ĝiaj feroĉaj kondiĉoj. Lin trafis la tradicia rusa malsano – drinkado, rezulte de kio estis multnombraj skandaloj, diboĉoj, en kiuj estis figuranta Jesenin. Ankaŭ estis senorda lia persona vivo. Li havis tragikan finalon de la vivo: la 28-an de decembro 1925 li estis trovita mortinta en la leningrada hotelo “Angleter”. Li tiam atingis nur 30-jariĝon de sia vivo. Do, ĉi-jare okazos ankaŭ ronda 95-a datreveno de lia perejo. Perejo de Jesenin estis vera tragedio por la rusa literaturo. Kiel diris la mondfama dancistino Ajsedora Dunkan (kiu dum certa tempo estis edzino de Jesenin) post konatiĝo kun li: “Jesenin estas ĥuligano, Jesenin estas anĝelo”.

Dum la lastaj jaroj de sia vivo poeto antaŭsentis sian baldaŭan pereon, pro kio en liaj versaĵoj de tiu periodo ofte sonis motivo de efemereco de ĉio vivanta sur la tero: kaj de la naturo, kaj de la homa ekzisto. Tiu ĉi motive sentebblas en la prezentataj poemoj “**Trans fenestro luno...**” kaj «**Ĉiuj ni foriras senevite...**»

Ludmila Novikova

Tradukita poezio
Sergej Jesenin

Берёза

Белая берёза
Под моим окном
Принакрылась снегом,
Точно серебром.

На пушистых ветках
Снежною каймой
Распустились кисти
Белой бахромой.

И стоит берёза
В сонной тишине,
И горят снежинки
В золотом огне.

А заря, лениво
Обходя кругом,
Обсыпает ветки
Новым серебром.

1913

Гой ты, Русь моя родная...

Гой ты, Русь моя родная,
Хаты – в ризах образа...
Не видать конца и края –
Только синь сосёт глаза.

Как захожий богомолец,
Я смотрю твои поля,
А у низеньких околиц
Звонно чахнут тополя.

Пахнет яблоком и мёдом
По церквам твой кроткий Спас,
И гудит за корогодом
На лугах весёлый пляс.

Если крикнет рать святая:
«Кинь ты Русь, живи в раю!»
Я скажу: «Не надо рая,
Дайте родину мою».

1914

Betulo

La betulo blanka
Trans fenestra bret'
Kovris sin per neĝo,
Kiel per arĝent'.

Kuŝas neĝ' bordere
Sur lanuga branĉ',
Pendas la panikloj,
Kiel blanka franĝ'.

Staras la betulo,
Dormas en trankvil',
Fajras la neĝeroj
Per oreca bril'.

Leviĝanta lante
Sorĉistin' aŭror'
Ree kovras branĉojn
Per arĝent-pulvor'.

Traduko: Ludmila Novikova (2016)

Hoĵ Rusio vi, patrino...

Hoĵ Rusio vi, patrino,
Ĥatoj – festa ikonmur'...
Ne videblas via fino –
Nur karesas altlazur'.

Kiel pilgrimul' pasanta
Mi rigardas al kamp-for',
Ĉe barilo vilaĝranda
Poploj ĝemas en langvor'.

Pom-miela disodoro
Traas festojn de l' Savant'.
En herbejo rondohoro
Dancas kun la gaja kant'.

Se sanktuloj min admonos :
«For Rusion, jen Eden'!».
«For Edenon ! » – mi rezonos,
Lasu min en hejma ben'!»

Traduko: Ludmila Novikova (2015)

Над окошком месяц...

Над окошком месяц, под окошком
ветер,
Облетевший тополь серебрист и
светел.

Дальний плач тальянки, голос
одинокий –
И такой родимый, и такой далёкий.

Плачет и смеется песня лиховая.
Где ты, моя липа? Липа вековая?

Я и сам когда-то, в праздник
спозаранку
Выходил к любимой, развернув
тальянку.

А теперь я милой ничего не значу.
Под чужую песню и смеюсь, и
плачу.

1925

Trans fenestro luno...

Trans fenestro – luno, trans fenestro –
vento,
Nudiĝinta poplo helas per arĝento.

Ploras harmoniko, sono belminora –
Sonas tia kara kaj tiome fora.

Ploras kaj tuj ridas tiu kant' sen fino.
Kie vi vin kaŝas, mia tili-ino?

Ankaŭ mi junaĝe dum festtag' iame
Por knabino mia harmonikis same.

Nun la amatin' min kvazaŭ ne plu vidas.
Kun la fremda kanto ploras mi kaj ridas.

Traduko: Ludmila Novikova (2015)

Мы теперь уходим понемногу...

Мы теперь уходим понемногу
В ту страну, где тишь и благодать.
Может быть, и скоро мне в дорогу
Бренные пожитки собирать.

Милые берёзовые чащи!
Ты, земля! И вы, равнин пески!
Перед этим сонмом уходящих
Я не в силах скрыть своей тоски.

Слишком я любил на этом свете
Всё, что душу облекает в плоть.
Мир осинам, что, раскинув ветви,
Загляделись в розовую воду.

Много дум я в тишине продумал,
Много песен про себя сложил.
И на этой на земле угрюмой
Счастлив тем, что я дышал и жил.

Счастлив тем, что целовал я женщин,
Мял цветы, валялся на траве
И зверьё, как братьев наших меньших,

Ĉiuj ni foriras senevite...

Ĉiuj ni foriras senevite
Al la lando de trankvil' kaj ĝoj'.
Eble baldaŭ ankaŭ mi subite
Pakos miajn aĵojn por la voj'.

Ho vi, plenaj de ĉarmec' betuloj!
Vi, teren' ! Kaj vi, ebena for' !
Ĉe la tuta ar' de forpasuloj
Ne kaŝeblas mia korangor'.

Mi tro amis ĉion materialan,
Veston de l' anim' sur nia ter'.
Amis mi tremolon tremfolian,
Rigardantan glacon de river'.

Multajn pensojn pensis mi pri vero,
Multajn kantojn verkis en inspir'.
Kaj feliĉas mi, ke sur la tero
Vivis mi serene, en plenspir'.

Kisis mi virinojn plaĉaspektajn,
Ĉifis florojn, kuŝis en freŝkamp',
Kaj la bestojn, niajn fratojn etajn,

Никогда не бил по голове.

Знаю я, что не цветут там чащи,
Не звенит лебяжьей шеей рожь.
Оттого пред сонмом уходящих
Я всегда испытываю дрожь.

Знаю я, что в той стране не будет
Этих нив, златящихся во мгле.
Оттого и дороги мне люди,
Что живут со мною на земле.

1924

Гори, звезда моя, не падай...

Гори, звезда моя, не падай,
Роняй холодные лучи,
Ведь за кладбищенской оградой
Живое сердце не стучит.

Ты светишь августом и рожью
И наполняешь тишь полей
Такой рыдалистою дрожью
Неотлетевших журавлей.

И, голову вздымая выше,
Не то за рощей – за холмом
Я снова чью-то песню слышу
Про отчий край и отчий дом.

И золотеющая осень,
В берёзах убавляя сок,
За всех, кого любил и бросил,
Листовою плачет на песок.

Я знаю, знаю. Скоро, скоро
Ни по моей, ни чьей вине
Под низким траурным забором
Лежать придётся так же мне.

Погаснет ласковое пламя,
И сердце превратится в прах.
Друзья поставят серый камень
С весёлой надписью в стихах.

Но, погребальной грусти внемля,
Я для себя сложил бы так:
Любил он родину и землю,
Как любит пьяница кабак.

1925

Mi neniam batis je la kap'.

Scias mi – ne floras tie plantoj,
Ne sonoras cigna kol' de spik'.
Tial ĉe la ar' de forpasantoj
Spertas mi tremadon de panik'.

Scias mi – ne estos tie pomoj
Nek grenkamp', oranta en malhel'.
Tial karas por mi ĉiuj homoj,
Kiuj vivas pace sub ĉiel'.

Traduko: Ludmila Novikova (2015)

Bruladu mia stel' kun brilo...

Bruladu mia stel' sen falo,
Radiojn sendu de alt-for',
Ĉar post la tomba vivfinalo
Ne pulsas ja la homa kor'.

Vi lumas per aŭgust' kaj herboj,
Sub vi pleniĝas la kampar'
Per ploro de la gruaj herdoj,
Ne elmigrintaj al transmar'.

Kaj eklevante supren kapon,
Ĉu el arbar', ĉu trans la holm'
Denove aŭdas mi la kanton
Pri patra land' kaj patra dom'.

Bremsante sukcon de betuloj,
La oriĝanta jam aŭtun'
Pri l' forlasitaj proksimuloj
Per folifalo ploras nun.

Mi scias, scias. Baldaŭ, baldaŭ
Kaj ŝajne pro nenies kulp'
En la malvarma tombo barda
Ekkuŝos mi post la sepult'.

Estingos sablo la kanzonon,
Polvigos mian koron mort'.
Amikoj metos grizan ŝtonon
Kun sprita epitafa vort'.

Kredante ties oracion,
Mi tamen skribus sur tabul' :
«Li same amis la patrion
Kiel drinkejon la drinkul'».

Traduko: Ludmila Novikova (2015)

140-jariĝo de Aleksandr Grin

Aleksandr Spepanoviĉ Grin (23.08.1880, u. Slobodkoj en Vjatka gubernio – 08.07.1932, Starij Krim en Krimeo – la vera familinomo *Grinevskij*) estis la rusa verkisto, reprezentanto de la novromantikismo en la rusa literaturo, aŭtoro de filozofi-psikologiaj verkoj kun elementoj de simbolisma fikcio. Grin kreis fantazian landon, kiun poste oni sprite nomis “Grinlando”. En tiu ĉi lando pasas eventoj de multaj liaj libroj, inkluzive la plej famajn romantikajn verkojn – romanon “La kurantino sur la ondoj” kaj fenovelon “La skarlataj veloj”.



La prozaĵoj de Grin havas poeziecan karakteron, pro tio sprite famas lia ĉefverko “Skarlataj veloj”. Kiel la ĉefan personaĵon de la novelo Assol, nin ravas la romantika simbolo de la skarlataj veloj. Veloj estas simbolo de revo, espero, kaj la helruĝa koloro alportas ĝojon kaj kredon, ke la revoj realiĝos.

Kvar romanoj de Grin kaj pluraj liaj rakontoj kaj noveloj estas esperantigitaj, ĉefe de Jurij Finkel, ilin eblas facile trovi en Interreto: <http://www.esperanto.mv.ru/Grin/index.html>.

La plej poezieca ĉefverko de Grin “Skarlataj veloj” aperis dum la matura periodo de lia krea vivo (ĝi estis publikigita en 1923). Sed komence de sia verkista kariero A. Grin

verkis ankaŭ poeziaĵojn. La unuaj liaj versaĵoj estis publikigitaj ekde 1907 jaro. Tiam estis disfloro de la novsimbolismo en la rusa literaturo. Nun ni prezentos al vi unu el la versaĵoj de Grin “**Trans river’ en roza lumo**” (1909), kiu estas bona ekzemplo de la simbolisma verko, kies enhavon eĉ ne eblas komenti, tiom mistikisme malpreciza ĝi estas. Kion simbolas la mistera Kavaliro? Eble simbolo de Eterna Malbono? Eblas kompreni tion tutdiverse. Ni atentigu pri tre grava detalo: en la versaĵo ni jam klare vidas inklinton de Grin al la ruĝa koloro en diversaj ĝiaj nuancoj.

La dua prezentata poemo estas marista kanto el la novelo “Ŝipoj en Liss” (1922). Ĝia rusa originalo fariĝis bazo por siatempo populara kanto laŭ muziko de P. Besprozvannij (1963).

За рекой в румянном свете...

За рекой в румянном свете
Разгорается костер.
В красном бархатном колете
Рыцарь едет из-за гор.

Trans river’ en roza lumo...

Trans river’ en roza lumo
Pliardiĝas sun-sorir’.
En velura punc-kostumo
Ĉevaliras kavalir’.

Ржет пугливо конь багряный,
Алым заревом облит,
Тихо едет рыцарь рдяный,
Подымая красный щит.

И заря лицом блестящим
Спорит – алостью луча –
С молчаливым и изящным
Острием его меча.

Но плаща изгибом черным
Заметая белый день,
Стелет он крылом узорным
Набегающую тень.

1909

Песня моряков

Не ворчи, не ворчи, океан, не пугай.
Нас земля, нас земля испугала давно.
В теплый край - южный рай -
Приплывем все равно.

Припев:
Хлопнем, тетка, по стакану!
Душу сдвинув набекрень,
Джон Манишка без обмана
Пьет за всех, кому пить лень!

Ты, земля, стала твердью пустой:
Рана в сердце... Сядею... Прости!
Это твой след такой...
Ну - прощай и пусти!

Припев.

Южный Крест там сияет вдали,
С первым ветром проснется компас.
Бог, храня корабли,
Да помилует нас!

Time henas ruĝstalono,
Skarlatita per rebriĵo,
Kavaliro vermiljona
Rajdas kun purpura ŝild'.

Kaj aŭror' per ruĝo hela,
Per sunstria akra ard'
Rivaladas kun brilbela
Pint' de l' kavalir-ponard'.

Sed la kavaliro sombra
Per mantela nigra al'
Sternas la flugantan ombron
Al la hela taga val'.

*Traduko de Ludmila
Novikova (2020)*

Kanto de maristoj

Per koler' ne timigu nin, mar'.
Nin timigas delonge la ter'.
Al la varma en sud' insular'
Nin venigos esper'.

Refreno:
Verŝu glason plenan, oldulin',
Kaj forgesu pri anima ĝem'
Drinkas John Kravato nun sen fin'
Je la homoj, kiuj pigras drinki mem.

Iĝis tero malplena sekaj':
Kora vundo... Hargriz' en anim'...
Tian spuron surmetis la aĝ'...
Do adiaŭ kaj lasu nin!

Refreno.

Suda Kruc' tie brilas en for'.
La kompason vivigos ventspir'.
Dio gardu la ŝipojn en glori'
Kaj nin savu en nia ir'!

Esperantigis Jurij Finkel

175-jariĝo de la Rusa geografia societo



La 20-an de aŭgusto okazis 175-a datreveno de la fondo de la Rusa geografia societo la plej malnova socia organizo en Rusio. Ĝi ludis gravegan rolon en sciencaj esploroj de Rusio kaj apudaj landoj, Arktio kaj aliaj partoj de la mondo. Grave, ke dum certa periodo en 1960-aj–70-aj jaroj en ĝi funkciis Esperanto-kurso, kiun gvidis aktiva

membro de la societo fama geografo kaj naturprotektanto David Armand.

Originala poezio

Al jubileo de la Rusa geografia societo

Klara Ilutoviĉ

Pioniroj, romantikuloj,
Virga spaco kun bar' post bar'.
De la entuziasmo bruloj
Por malkovro, esplor', mapar'.

Novaj kampoj, montoj, riveroj,
Nova planto kaj animal;,
Kaj periegemaj danĝeroj
el gvatejoj de l' novreal'.

Vastaj neĝaj, akvoj, dezertoj.
Ia – kies? – enigma spur'.
Ĉu aperos baz' de asertoj
Pri l' ruiniĝinta kultur'?

Sabloj de la Centra Azio.
Ĥara-Ĥoto³ en inta bril'.
Grava sciencista misio.
Granda venkatinga jubil'.

Blovas koren vokoj de ventoj
Starti al nekonata voj'
Por belego de trovmomentoj,
Por juniga malkovra ĝoj'.

³ Ĥara-Ĥoto ("nigra urbo") – arĥeologia monumento, restaĵoj de la tanguta urbo Edzino (Ĥejĵunĉeno) en Interna Mongolio (Ĉinio), priskribita de P.K. Kozlov post ekspedicio de la Rusa geografia societo en 1907-09.



Mihail Lomonosov (1714-1765)

Вечернее размышление о божием величии при случае великого северного сияния	Vespera meditado pri Dia potenco dum la superba arkta lumo
<p>Лицо свое скрывает день; Поля покрыла мрачна ночь; Взошла на горы черна тень; Лучи от нас склонились прочь; Открылась бездна звезд полна; Звездам числа нет, бездне дна.</p> <p>Песчинка как в морских волнах, Как мала искра в вечном льде, Как в сильном вихре тонкий прах, В свирепом как перо огне, Так я, в сей бездне углублен, Теряюсь, мыслями утомлен.</p> <p>Уста премудрых нам гласят: Там разных множество светов; Несчетны солнца там горят, Народы там и круг веков: Для общей славы божества Там равна сила естества.</p> <p>Но где ж, натура, твой закон? С полночных стран встает заря! Не солнце ль ставит там свой трон? Не льдисты ль мещут огонь моря?</p>	<p>Vizaĝon sian kaŝas tag’; La kampojn kovris nokta sombr’; Sunstrioj dronis for en svag’; Surgrimpis montojn nigra ombr’; Abismo jen kun stel-abund’; Stelsvarm’ – sen kvant’, abism’ – sen fund’.</p> <p>Kiel sablero en la mar’, Kiel fajrer’ en arkta lum’, Kiel dum ŝtormo la polvar’, Kiel en arda flamo plum’, Mi same pro l’ abism-profund’ Perpleksas en la pens-inund’.</p> <p>Doksdiras⁴ buŝ’ de l’ saĝegul: Multiĝas tie univers’; Senfinas de sun-kvantoj brul’, De popular’ kaj temp’ divers’: Por gloro de l’ Superpotenc’ Samfortas tie tutesenc’.</p> <p>Naturo, kie via leĝ’? Aŭroron levas nokt-landar’! Ĉu l’ suno tronas en la neĝ? Ĉu flamon ŝprucas glaci-mar’?</p>

⁴ *dokso* – opinio, koncepto, kredo (Henry Vatré. Neologisma Glosaro. – Saarbrücken, 1997, p.49)

Се холодный пламень нас покрыл!
Се в ночь на землю день вступил!

О вы, которых быстрый зрак
Пронзает в книгу вечных прав,
Которым малой вещи знак
Являет естества устав,
Вам путь известен всех планет, –
Скажите, что нас так мятет?

Что зыблет ясный ночью луч?
Что тонкий пламень в твердь разит?
Как молния без грозных туч
Стремится от земли в зенит?
Как может быть, чтоб мерзлый пар
Среди зимы рождал пожар?

Там спорит жирна мгла с водой;
Иль солнечны лучи блестят,
Склонясь сквозь воздух к нам
густой;
Иль тучных гор верьхи горят;
Иль в море дуть престал зефир,
И гладки волны бьют в эфир.

Сомнений полон ваш ответ
О том, что окрест ближних мест.
Скажите ж, коль пространен свет?
И что малейших дале звезд?
Несведом тварей вам конец?
Скажите ж, коль велик творец?

1743


Ĉi flam' malvarma kovris nin!
Ĝi nokte venis el nord-sin'!

Vi, kies akra vid-rimark'
Penetras libron de l' etern',
Por kiuj estas eta mark'
De la natur-esenco kern',
Planedajn vojojn scias vi –
Pro kio do perpleksas ni?

Kiel dum nokt' aperas lum'?
Kia flamstrion ĵetas fort'?
Kiel sen nuboj povas fulm'
Sin levi de la tero sor'?
Kiel vapor' de glaciār'
Dum vintro iĝas flama mar'?

Ĉu brulas pinto de krater';
Ĉu brilas de la suno stri',
Traante denson de aer';
Ĉu de l' miasmoj reakci';
Ĉu sen zefir' en mara sfer'
Elektro strebas al eter'?

Dubindas ĉiu la respond'
Eĉ pri la lok' proksima plej.
Do diru, kiom grandas mond'
Kaj kio post plej dista stel'?
Ĉu estos fin' de l' vivmedi'?
Ĉu, diru, plenpotencas Di'?



*Traduko de Ludmila Novikova
(2020)*



EN JEMENO

Vladimir Samodaj

Mi alflugis en la ĉefurbon de la Araba Respubliko Jemeno Sanaa en majo 1964. La urbo situas je 2200 metroj super la marnivelo. Mi devis esti interpretisto en kvarpersona grupo de sovetaĵ specialistoj pri agrikulturo.

Oni montris al mi magazenojn, kie mi povis aĉeti manĝaĵojn kaj bezonatajn varojn. En unu magazeno mi ekvidis japanajn fotilojn, tenis en la manoj filmilon, sed kun bedaŭro metis sur la vendotablon.

- Prenu! -diris la vendisto.
- Mi ne havas monon.
- Prenu! Monon poste alportos.

Mirinde! Neniama antaŭe mi aŭdis tiajn vortojn! La mastro-vendisto vidis min la unuan fojon, sed jen, tiel simple:

- Prenu!

Mi prenis. Ricevinte la provizoran antaŭpagon, tuj alportis la monon. Evidentiĝis, ke la filmilo kostas nur duonon de la monata salajro. Nemulte ja!

Poste mi multe filmis en Jemeno. La filmilo funkciis je la 8-milimetra filmobendo. Nun tiaj ne ekzistas, sed tiam ĝi estis superbona. En la prezon de la bendo eniris ankaŭ la rivelado. Mi sendadis la filmitajn bendojn el Jemeno en



Ni havis similan aŭton, sed ĝi estis multe pli malnova

Londonon kaj post tri semajnoj ricevadis ilin pretaj. Mi havas hejme multajn neripeteblajn momentojn...

Jemena Araba Respubliko estas tre interesa lando. Trafinte tien oni sentas sin en fabela lando el «Mil kaj unu noktoj», des pli ke ankaŭ la lingvo estas ĝuste tiu – la araba. En tempoj antikvaj ĉi-tie situis la biblia reĝlando Saba, kies carino vizitis caron Solomonon. Ĉi-tie la loĝantaro nomas sin Bilkis.

Antaŭ septembro 1952 en Jemeno regis reĝo, tamen grupo de junaj oficiroj, lernintaj en Grandbritio, decidis fari el la reĝlando respublikon kaj detronigis la reĝon. Oni povas supozi, ke respubliko bezonas gvidanton, prezidenton. La oficiroj venis nokte al la estro de la reĝa arsenalo kaj postulis:

– Estu nia prezidento. Se ci ne volas, ni cin mortigos.

En arabujo oni ne vi-umas.

Tiu eĉ ne pensis, konsentis. La promeso mortigi ne estis vanaj vortoj.

La historion rakontis al mi aliaj junaj jemenaj oficiroj. Eble tio ne estis mensogo.

Mi venis en Jemenon en majo 1954. Laŭ la juĝo de historiistoj la kultura-ekonomilka nivelo enlande troviĝis tiutempe en la 13-14-a jarcentoj, la socia sistemo estis triba. Enlande ne ekzistis uzinoj, fabrikoj, kinejoj, televido ktp. Post la «revolucio» komenciĝis evoluigo. Multon konstruis Sovetunio – uzinojn, hospitalojn, havenon, vojojn.

La ĉefurbo Sanaa

... Ni, sovetiaj specialistoj pri agrikulturo, veturas el la ĉefurbo Sanaa en la regionon Radaa laŭ la peto de ties loĝantoj kun la celo esplori la situacion kaj doni konsilojn pri evoluigo de la regiono. Ni estas sesopo en la ĉiavoja aŭto – teknikisto, hidrologo, agronomo, tradukisto (mi) kaj du jemenanoj – reprezentanto de la ministerio Abdulla kaj ŝoforo Aĥmad.

La vojo estas longa, laciga, sed interesa. Jen ni preterpasas lokon, kie en 1488 estis murdita jemena reĝo-imamo. Reĝoj estis samtempe religiaj estroj (imamoj) kaj ĉefjuĝistoj. Jen la aŭto pene grimpas sur krutajn deklivojn kaj niaj koroj haltas pro la ĝoja streĉo: la radoj ruliĝas sur la rando de la centmetra abismo. Antaŭ ni sur la suproj de montoj aperas nevenkeblaj fortikaĵoj-vilaĝoj kaj iuj el la domoj, ŝajne, ŝvebas super la senfundaj abruptoj. En la antikvaj tempoj ĉiu tribo strebis konstrui sian vilaĝon sur alta monto, por savi sin de malamikoj.



Ni vidas kampojn sur la deklivoj, ĉiu kampo, ne pli larĝa ol kelkaj metroj, sin apogas al fortika ŝtona muro por savi la kampon de diluvaj montaj pluvegoj. Por konstrui tian kamparon bezonatas vivo de kelkaj generacioj.

La aŭto pasas sur maro de polvo, kaj post kelkaj momentoj niaj haroj iĝas grizaj, sur la genuoj

formiĝas polva tavolo. Ni penas kovri la nazojn kaj buŝojn per tukoj, sed tio ne multe helpas.

Ni laciĝis kaj serĉas iun arbeton por ripozi en ĝia ombro, tamen veturas multajn kilometrojn, kaj ĉirkaŭ ni nur altas nudaj rokoj, nigraj pro la sunradioj. Fine ni trovas solecan arbon – ankaŭ tio okazas! – saltas el la tedinta aŭto, manĝas bovajajn konservojn, trinkas varmiĝintan akvon kaj post nelonga ripozo daŭrigas la vojon.

Post kelkaj horoj ni atingis la celon – venis en la urbon Radaa, centron de la samnoma regiono. Neniu atendis nin. Tamen, malgraŭ ke jam estis malfrue, la novaĵo pri veno de sovetaĵ specialistoj fulmrapide flugis tra la urbo kaj post kelkaj minutoj aperis urbaj kaj regionaj estroj. Ili kondukis nin en la administrejon, kiu samtempe estis hotelo kaj prizono.

La administrejo estas kvaretaĝa domo. En la unua (surtera) etaĝo situas estroj kaj gardistoj, ankaŭ prizono kun ligna krado. Ĉe la krado staras prizonito kun ĉenoj sur la kruroj. La gardistoj, kiel ĉiuj jemenaj montanoj, estas vestitaj en jupojn, jakojn, ĉiu havas larĝan broditan zonon kun kurba ponardo kaj monsaketo, ĉies bruston krucas strioj kun kartoĉoj, en la manoj pafilo. Tamen, malgraŭ la armiloj, iliaj vizaĝoj ne aspektas severe: tuj videblas, ke homoj ili estas amikemaj, armilaron laŭ la popola kutimo portas ne nur gardistoj, sed ĉiuj viroj. Surkape ili havas volvitan tukon, la piedoj nudas.



La administrejo okupas du mezajn etaĝojn, la supra estas destinita por gastoj. Tie jam loĝas tri egiptanoj. Ili estas instruistoj. Du ĉambrojn oni donas al ni. En la ĉambroj mankas mebloj. Sur la tera planko kuŝas tapiŝoj, matracoj kaj

longaj kolbassimilaj kusenoj. Sur matracoj oni sidas, sin apogante al kusenoj. La fenestraj truoj ne estas vitritaj.

Abdulla, kio arblingve signifas «sklavo de Allaho», kaj ruslingve «раб божий», nia akompananto el la ministerio pri agrikulturo, ion diras al la urbestro, kaj tiu ordonas al unu el la gardistoj trovi por ni kvar litojn. Ni diras, ke tio ne bezonatas, ke por ni ne gravas sur kio dormi, tamen la gardisto jam foriris. Ni sidiĝas sur la tapiŝojn, kruciginte la kruojn arabmaniere, kaj komencas konversacion. Detale kaj ĉiufanke konatiĝinte kun la peto de niaj mastroj, ni difinas niajn taskon kaj laborplanon. Post abunda kaj bongusta manĝo ni okupas jam preparitajn por ni ferajn litojn.

Frumatene ni elveturas por konatiĝi kun la regiono. Nin akompanas la ĉefa ŝejho de tiu teritorio, ŝejho de ŝejhoj, estro de ĉiuj lokaj triboj. La regiono situas alte en montoj kaj okupas multajn grandajn kaj etajn intermontajn ravinojn kun dissemitaj en ili vilaĝoj kaj urbetoj. Ni vizitas vilaĝojn, parolas kun la loĝantoj, kaj tio helpas al ni precizigi niajn planojn. La ĉefa problemo ĉi-tie estas manko de akvo. Ekzistas lokoj, de kie oni eliras frumatene kun azeno por reveni kun akvo nur sekvatage vespere.

Ni venis en la ravinon Abbas. Ĝi estas vasta, tamen havas nur unu puton, el kiu virinoj pene levas truitajn ŝafofelojn kun akvo helpe de longaj ŝnuroj, kiujn tiras kameloj. La vizaĝoj estas kovritaj per iu verda ŝmirajo. Evidentiĝas ke la lokaj virinoj ŝmiras la vizaĝojn por defendi ilin de la senkompataj sunradioj. Vespere, kiam ili forigas la ŝmirajon, iliaj vizaĝoj restas nature blankaj. Tamen tio eblas nur en la regionoj, kie la loĝantaro ne tro observas la islaman regulon kaŝi la vizaĝon de la viraj okuloj. Cetere, araboj apartenas al la blanka raso.

Ni venas en alian vilaĝon, la loĝantoj invitas nin tagmanĝi kun ili. Ni provas rifuzi, dezirante daŭrigi la vojon, por pli multe vidi dum tiu tago, sed la mastroj ne konsentas. Eksciinte, kio ni estas, ili deklaris al la ĉefŝejho:

– Se la eksterlandaj gastoj ne manĝos kun ni, ci ofendos nian gastamon, do ni cin mortigos!

Abdulla rakontis al ni tion kaj ni konsentis resti. Tio ne estis simpla minaco al la ĉefŝejho. Tia estas la loka moro.

Tuj estis buĉitaj du ŝafoj, oni ekfritis ilin, komencis kuiri rizon. Dum daŭris la kuirado, oni ne sciis, kion fari. Iu proponis pafkonkurenci – pafilojn ja havis ĉiuj lokanoj. Proksimume je la dudekmetra distanco estis metitaj negrandaj ŝtonoj. Komenciĝis pafado, fojfoje iu trafis, tion sekvis aklamoj. Iu proponis pafilon al la estro de nia grupo, Ivan Mihajloviĉ. Tiu rifuzis, montris al mi. Mi do kun plezuro, en la armeo mi trejnadis la regionan teamon. Trafis unu ŝtonon, kaj alian, la trian. Komuna jubilo.

– Ho! Ĉampiono! Kie lernis?

Mi diris ion saĝan, kio vekis plian estimon al mia persono. Kiel do! – parolas en ilia lingvo kaj pafas pli bone ol ili, denaskaj batalantoj!

La ritualo de la tagmanĝo estis tre interesa, tamen rakonti mi ne povas – pasis ja tro multa tempo, preskaŭ ĉio estas forgesita. Hejme, en Moskvo, mi havas bonajn filmitajn fragmentojn.

Virinoj, laŭ la lokaj moroj, la konversacion kaj la manĝadon en la kompanio de viroj ne partoprenis.

Kiam ni ekpredis forveturi, la vilaĝanoj ne volis kun ni disiĝi. Poste dekojn da kilometroj nin akompanis duonmilitaj aŭtoj, el kiuj oni svingis al ni mane, skuis pafilojn, pafadis aeren.

Mi feliĉis traveturi duonon de tiu gastama lando, viziti la ĉebordan dezerton Tihama, la plej varman regionon en Jemeno. Eĉ vintre la temperaturo ne falas sub 26 gradojn celsiajn, somere ĝi superas 50 gradojn. Tie regas eterna somero.

Laŭvoje ni ofte haltis apud putoj por mezuri la akvonivelon kaj akvoreĝimon. Vidante nin, la virinoj kun krioj diskuradis, se apude ne estis viroj. Kiam apudis viroj, ĉio pasis multe pli trankvile, kaj niaj interparoloj estis tute amikaj.

Plenuminte nian taskon ni veturas en la urbon Ĥodejda, situanta ĉe Ruĝa maro. La vojo teruras. Verdire, ĝi ne ekzistas, la aŭto rampas kun la rapido ne pli ol 15-20 kilometroj hore. Dekstre de ni altas montoj, maldekstre dezerto. Ofte videblas diversaj animaloj. Ni veturas longe. La dezerto senfinas.

Subite dekstre de ni, inter du montoj, leviĝas altega ondo de sablo, renversiĝas, roras. Komenciĝas sabla uragano, la sablo en la aero densiĝas pli kaj pli. Ni veturas plu, senhalte, ĉar halti ne eblas. Se nia aŭto haltus, tuj super ĝi kreskus duno. La vojo ne ekzistas, ni vidas prekaŭ nenion, do simple veturas



antaŭen – nur ne halti! Post proksimume tri horoj la ŝtormo komencas iĝi mapli forta.

Jen la aŭto surgrimpas altaĵon kaj antaŭ ni aperas neesprimebla vidaĵo – mirinda antikva urbo. Ŝajnas, ke tio estas miraĝo, ĉar super la tero pendas sabla nebulo kaj la urbo

kvazaŭ ŝvebas en la aero. Antikvaj muroj ĉirkaŭas ĝin, strebas alten la gardoturoj kaj minaretoj, videblas belaj jemenstilaj domoj. La urbo ŝajnas esti morta, videblas eĉ ne unu homo. Ni proksimiĝas. Malantaŭ duno aperas du virinoj, rajdantaj azenojn. Ankoraŭ unu virino iras piede, portante surkape grandan pezon. Post ŝi kuras nuda infano, falas, sin levas, denove kuras.

Ni preterpasas urbon Zabid, kiu iam estis ĉefurbo de Jemeno. La mirinda vidaĵo baldaŭ malaperas.



Venas vespero. La suno malgaje dronas en sablo. Kun la mallumo sur la dezertan vojon eliras karavanoj de kameloj kun grandaj portaĵoj. Fiere kaj morne ili paŝas inter maloftaj herbaĵoj.

Malfruvespere ni enveturas Ĥodejdon kaj, apenaŭ lavinte en la Ruĝa maro niajn polvitajn korpojn, plonĝas en pezan dormon...

– Indas rakonti pri la jemena mono. Mia monata salajro konsistis el 280 aŭstraj rialoj de la 1780 jaro kun portreto de Maria-Terezia. Ĉiu monero pezis 29 gramojn, sekve mia salajro pezis plo ol ... 8 kilogramojn! Mi miris – kie ili prenis tiom da malnovaj eŭropaj moneroj por pagi al ĉiuj? Evidentiĝis, ke tiuj moneroj estis stampataj en Jemeno mem! Cetere, mia salajro estis pli granda, ol tiu de la ministro pri agrikulturo, kun kiu ni laboris. Kiam ni vizitadis lin en lia kabineto, ĉiam ĉe la muro brakdistance staris pafilo kaj surtable kuŝis mitraleto.

En Sanaa estis stampataj ankaŭ aliaj moneroj el diversaj metaloj, kun arabilgvaj skribaĵoj. Estis tre maloportune, ke rialo konsistis el kvardek onoj – kirŝoj, sed ne el kutimaj por ni centonoj. Pro tio, se vi aĉetis ion por 20 kirŝoj, vi elspezis jam duonon de rialo, do rialoj degelis tro rapide. Ekzistis moneroj, kiuj nomiĝis *duono*, *kvarono*, *okono*, *duonokono*. Post kelkaj monatoj aperis nova mono, monera kaj eĉ papera.

Okazadis, ke necesis ion peti de la lokaj instancoj. Leteron eblis skribi sur ajna paperaĉo, ĉar la kutiman por ni skribpaperon la homoj ne havis. Antaŭ ĉio necesis skribi *bismi lahi ŭa baad*, kio signifas *je la nomo de Allaho kaj poste*, kion sekvis la konkreta peto.

Ni, sovetaĵaj specialistoj, ankaŭ prezentadis niajn petojn en la kutima por ili formo. La leterojn mi skribis mane, mia skribmaniero estis bona. En unu el la leteroj ni petis doni al ni tajpilon, do mi estis devigita lerni tajpadon, ĉar niajn laborajn raportojn necesis prezenti en tri ekzempleroj.

Post 9 monatoj en Jemenon venis mia edzino. En Kairo ŝi devis tri tagojn atendi aviadilon al Jemeno, por tio oni donis al ŝi en Moskvo 10 usonajn dolarojn, kaj la permeson havi tiun monon oni donis komunan por ŝi kaj iu specialisto, devinta kunflugi. Tiu persono flugis pli frue, do ŝi restis sen permesilo. La dogano en Moskvo forprenis de ŝi tiujn 10 dolarojn, ĉar soveta civitano ne rajtis havi fremdan valuton sen la rajtiga dokumento. Tiaj estis reguloj en tiutempa Soveta Unio. Bone ke tiam en Kairo jam laboris miaj samgrupanoj-geedzoj, kiuj helpis al ŝi en tiu komplika situacio...

Kiam mia edzino venis en Jemenon, ĉiunokte ie proksime aŭdiĝis eksplodoj – tiamaniere oni solvadis siajn revoluciajn problemojn. La edzino tre timis, ŝirmis la orelojn per kusenoj. Dum unu el tiuj noktoj pereis vic-ĉefministro, tre agrabla maljunulo, kun kiu kunlaboris nia grupo.

Foje mi tre ekplaĉis al unu jemenano. Li proponis al mi edzine sian 16-jaran filinon. Mi devus pagi por ŝi 3 rialojn – por tiu mono estis eble aĉeti ŝafon (mi ja ricevadis monate 280!). Mi protestis:

- Mi jam havas edzinon.
- Ne gravas, estos du.
- Sed mi baldaŭ forveturos kaj ne povos ŝin kunpreni.
- Ne gravas. Mi ŝin vendos al iu alia.

Estis tre malfacile klarigi al li, ke ni ne rajtas havi pli ol unu edzinon, li ne povis kompreni tian stultajon.

Tiamanire por mia salajro mi povus aĉeti 93 edzinojn monate, unu rialo eĉ restus por la regalo...

Tamen, 16-jara kaj sen edzo? Ĉu ŝi havis ian difekton?

Foje min vizitis la konata ŝejho de ŝejhoj de la regiono Radaa. Li rakontis, ke je lia dispono estas dek mil soldatoj, ke li enterigis 9 edzinojn kaj 10 infanojn, kiuj mortis pro diversaj malsanoj. Infanoj ĉesis mortadi kiam li komencis nutri ilin per importita lakta pulvoro.

Multon interesan li rakontis al mi pri la vivo kaj moroj de jemenaj triboj. Fine diris:

– Ĝis reveno. Necesas veturi, edzigi filon.

– Kiomjara estas la filo, – demandis mi.

– Dek kvin.

Tie oni geedziĝas frue. Ĉar la vivo ne longas. Maljunuloj ne multas. En tiuj tempoj oni povis edzinigi knabinon okjaran, poste eduki ŝin ĝis la naskopova aĝo. Mi konis familion, kie la patrino estis 13-jara, la avino 27-jara kaj la praavino havis 41 jarojn. La vizaĝojn de tiuj virinoj mi ne vidis. Ne permeseblas.

Nia grupo, konsistanta el 5 personoj, loĝis en du apudaj duetaĝaj domoj, konstruitaj el ĉizitaj rokaj ŝtonoj. Antaŭ niaj domoj altis 9-etaĝa prezidenta palaco, kiu antaŭe apartenis al la reĝo. Inter niaj domoj kaj la palaco okazadis multaj interesaj eventoj, plurajn mi sukcesis filmi.

Foje el la palaco aŭdiĝis strangaj muzikaj sonoj iom similaj al la sovetia himno. Oni ludis false, sed obstine. Post kelkaj tagoj ni ekveturis al la primitiva aerhaveno. Alteriĝis aviadilo, el ĝi descendis Sekretario de Prezidio de la Supera Soveto de USSR kamarado Miĥail Georgadze. Laŭte kaj nekonkorde milita orkestro ekludis himnon de Soveta Unio. Do jen por kio oni tiel obstine ĝin ekzercadis! Subite vento forblovis kartuzojn de la tuta orkestro. Neniu el ili provis kapti kartuzon.

Georgadze ekis premi manojn al la renkontantoj, premis ankaŭ la mian. Mi decidis dum tri jaroj ne lavi la manojn. Tamen nelonge post tio mian manon premis la prezidento de Norda Jemeno Abdulla as-Sallal. Neniam en la vivo mi tuŝis tian malagrablan manon – ĝi estis mola, humida, malvarma. Tio devigis min lavi la manojn...

La prezidento Sallal (korbisto) inter la renkontantoj forestis. Ni renkontis lin dum la revena vojo.

Malfruis...

En niaj domoj ofte aperadis diversaj venenaj insektoj: skorpioj, falangioj kaj aliaj, ne pli agrablaj. Foje mi vekiĝis, ekvidis sur la muro proksimume je tridek centimetroj de mia kapo kolosan skorpion, ne malpli grandan ol krokodilo. Mi akurate malproksimiĝis de la muro, descendis. Trovis venenan aerosolon, neniigis la beston. Kompatinda estaĵo! Eble ĝi nur deziris admiri min...

Sufiĉe proksime de ni estis vasta spaco, nomata Majdan at-Taĥrir – Placo de Liberiĝo (verdire, en araba lingvo ne ekzistas majusklaĵ literoj). Tie okazadis paradoj kaj ekzekutoj – senkapigoj, senmanigoj, pafmortigoj. Mi filmis la parodon, dediĉitan al la dua jaro de la Respubliko, sed ekzekutojn neniam vizitis...



La mastro de unu el magazenoj – ili ne estis tiom grandaj, kiel en Eŭropo, kutime unu ĉambreto kaj iu rezerva ripozanguleto – estis bluokula. Mia edzino petis min demandi – kial? Tiu klarigis, ke li naskiĝis en regiono, kiu nomiĝas *biladu r-rus*, kio signifas *lando de rusoj*, Ruslando sekve. Tie loĝas multaj homoj bluokulaj, kies prauloj estis rusoj, militkaptitaj antaŭ multaj jarcentoj, dum la unuaj islamaj militiroj.


Estus eble multon rakonti pri tiu antikva lando, sed ion mi jam forgesis, ĉar laboris tie antaŭ pli ol duonjarcento, taglibrojn neniam havis, nenion notis. Tamen nenio el la rakontita estas mia fantazio, eble nur la grandeco de la skorpio.

Printempe de la jaro 1965 mi petis revenon al Moskvo, ĉar necesis pasigi vicajn ekzamenojn – mi ja estis studento, kaj mia laboro en Arabujo estis parto de studprogramo. Oni longe serĉis anstataŭanton, al la ekzamenoj mi malfruis, revenis hejmen nur en julio. Tio kaŭzis pli malfruan finon de la universitato.

La politika situacio enlande ne estis stabila – dum mia 14-monata restado en Norda Jemeno la registaro estis ŝanĝita 8-foje.

Post la reveno mi aliĝis al la eldona laboro en Esperanto, multe helpis al Konstatin Mihajloviĉ Gusev.















*Wibam.
en dezerto*














Bab al-Jemen,
la çefa pordo
de Sanaa





Interne la ĉambroj aspektas tiel.
La multkoloraj suproj neniam ripetigas.



Drak-arbo kaj botel-arbo.
Insulo Sokotra. Jemeno.


Esperanto en Odesa universitato

Tatjana Auderskaja

Odesa ĉiam estis centro de kultura vivo de la sudo de Rusia Imperio. La Novrusia (Odesa) Universitato, fondita en la jaro 1865, produktis la tutan plejadon de eminentaj sciencistoj sur la terenoj naturscienca kaj filologia. Sciencistoj tiutempe estis plejparte ne nur fakuloj pri siaj specialiĝoj, sed ankaŭ portantoj de alta kulturo, de diversflankaj interesoj pri ĉiuj vivaj fenomenoj – unuvorte, ili estis veraj “inteligentoj” en la rusa senco de la vorto.

Ni rakontos pri unu el tendencoj en kultura vivo de Odessa, ĉe komenco de kiu staris profesoroj kaj docentoj de Odesa (tiam Novrusia) Universitato. Temas pri ekesto kaj uzado de internacia helpa artefarita lingvo.

Unua prelego en la rusa lingvo pri la temo okazis en Odesa (tiam Novrusia) Universitato en marto de 1886. Profesoro de kompara lingvoscienco de Harkova Universitato **Vikentij Ivanoviĉ Ŝercl** (1843-1906) prezentis du prelegojn, poste eldonitajn en Moskvo kiel aparta libreto titolita «Tutmonda lingvo kaj gestado». Interese, ke en tiuj prelegoj estis asertita principa neoblo krei artefaritan internacian lingvon speciale por homa komunikado. Kiel ofte okazas, la vivo priridis rigorajn sciencajn konkludojn kaj logikajn ĝeneraligojn, ĉar jam en la sekva jaro, en 1887, estis kreita vivanta internacia lingvo Esperanto, kiu bonorde persistas dum pli ol 130 jaroj.



С. О. Шатуновский

La lulilo de Esperanto-movado fariĝis Odessa, kie, laŭ la neoficiala informo (Nuntempa Bulgario, 4-1959, p. 44) en 1889 estis fondita unua societo de esperantistoj «Espero», gvidata de V. A. Gernet kaj S. O. Ŝatunovskij. Poste multaj famaj odesanoj fariĝis esperantistoj: la urba ĉefarkitekto A. Bernardacci, sacerdoto kaj kantisto V. A. Ostrovidov, milita sekreta agente N. A. Geft, unu el fondintoj de Odesa elektroteknika instituto V. F. Didriĥson,

kiu asistis al inventinto de inkandeska lampo A. N. Lodigin kaj mem perfektigadis tiun inventaĵon.

El unua milo de esperantistoj, 51 persono prezentis Odeson, kaj en 1896 tie aperis jam oficiale registrita klubo. Ĝian bazon konsistigis urba sciencistaro: profesoroj kaj docentoj de Odesa (tiam Novrusia) Universitato R. A. Prendel, O. Ja. Pergament,

S. O. Ŝatunovskij, V. F. Kagan, medicinistoj I. M. Lucenko kaj V. V. Filippoviĉ, doktoro de mekaniko H. I. Gohman, instruisto D. D. Sigareviĉ, honora civitano de Odessa, diplomito de Odesa (tiam Novrusia) Universitato V. A. Gernet.



V. Ф. Каган

St.-Peterburga societo “Espero” kaj unu el fondintoj de Odesa filio de tiu societo. Li estis ankaŭ aktiva aganto de Odesa Krimea-Kaŭkazia montara klubo, kiu konsistis plejparte el anoj de Odesa Universitato kaj Odesaj Superaj porvirinaj kursoj. En 1894 sub gvido de R. A. Prendel okazis komuna kunsido de tiu klubo. Tamen, la ligoj de Odesa Universitato kaj Krimea montara klubo firmiĝis ne nur sur la kampo de naturscienco, sed ankaŭ sur Esperanta tereno; pli ĝuste dirite, tiuj terenoj ofte koincidis. Ekz., sur vaporŝipoj de Rusia Societo de Marnavigado kaj Komerco (РОПИТ), s-ino A. Borovko regule okazigis prelegojn pri Esperanto.



О. Я. Пергамент

V. F. Kagan kaj S. O. Ŝatunovskij estis kunfondintoj de la eldonejo «Mathesis» (1904-1925), unu el la plej renomaj sciencaj eldonejoj tiutempe. En 1909 V. A. Gernet publikigis tie sian broŝuron «Pri unueco de la materio».

Ĉiu el tiuj homoj faris sian kontribuon al evoluo de scienco, kulturo, edukado, sanprotektado de Odessa, al ĉiu el ili Odessa dankas sian (pasintan) gloron de rapide disvolviĝanta scienca kaj kultura centro.

Ŝtata konsilisto (5a rango en la Ranga tabelo), profesoro **Romul Aleksandroviĉ Prendel** (1851-1904). En 1894-1895 unu el gvidantoj de Odesa rondeto de esperantistoj, ano de



P. А. Прендель

Ni menciuj ankoraŭ kelkajn gravajn esperantistojn de Odessa.

Osip Jakovleviĉ Pergament (1868-1909). Matematikisto kaj juristo. Kelkfoje estis elektita kiel deputito de Odessa al la Ŝtata Duma. La 12an de oktobro de 1897 li publike prelegis pri la temo: “Skizo de evoluo de internacia lingvo”. La prelego estis eldonita broŝurforme en Odessa en 1898 kaj fariĝis unu el unuaj seriozaj pristudoj de Esperanto en la rusa lingvo.

Samuil Osipoviĉ Ŝatunovskij (1859-1929). Eksteretata docento en la katedro de pura matematiko de Novrusia (Odessa)

Universitato. Profesoro ekde 1905. Ĝuis vastan renomon kiel fondinto de odesa matematika skolo, ankaŭ kiel brila instruisto kaj populariganto de matematiko.

Veniamin Fjodoroviĉ Kagan (1869-1953). Ankaŭ eksteretata docento en la katedro de pura matematiko de Novrusia (Odesa) Universitato. Ekde 1923 profesoro de matematiko de Moskva Universitato. En 1904-1917 estis ĉefredakoro de la revuo "Heroldo de eksperimenta fiziko kaj elementa matematiko" (estis eldonata en 1886-1917), kie estis publikigataj artikoloj pri Esperanto kiel logika fenomeno.

Haim Iegudoviĉ Gohman (1851-1916). Ekde 1887 – eksteretata docento, ekde 1890 – doktoro de aplika matematiko (mekaniko) de Novrusia (Odesa) Universitato. Fondinto (en 1898) kaj direktoro de privata Komerca liceo, kie en 1897-1899 funkciis publikaj Kursoj de la lingvo Esperanto.

Verŝajne, intereso pri Esperanto en natursciencaj rondoj de Odessa aperis grandparte pro ĝia logika karaktero kaj matematike rigora strukturo. Interese, ke ankaŭ nun tiu aspekto de la lingvo altiras atenton de publiko. Ekz., la 3an de novembro de 1999 en la centro de Vieno, en kafejo "Einstein" kunvenis anoj de la "Klubo de logike pensantoj". Ili aŭskultis la prelegon "Esperanto: logika lingvo por logikemuloj".

Post la fino de la prelego fare de mag. Walter Klag okazis unuhora vigla pridiskuto.



Х. И. Гохман



В. А. Гернет

Vladimir Aleksandroviĉ Gernet (1870-1929). Kemiisto. Honora civitano de Odessa, direktoro de Vinfara instituto. Estis sekretario de Odesa Societo de esperantistoj. Subvenciis eldonadon de gazeto "Lingvo internacia", eldonata en Uppsala (Svedio); estis ĉefredakoro de tiu gazeto en 1895-1897. Tie estis publikigitaj liaj tradukoj de verkoj de V. G. Korolenko ("Fantomoj", 1895) kaj de H. Heine ("Pentraĵoj el vojaĝo", 1897, kune kun A. Kofman). Verkoj de kvar odesaj aŭtoroj, S. Ŝatunovskij, N. Borovko, V. Gernet kaj A. Kofman, eniris la "Fundamentan krestomation de la lingvo Esperanto" (Parizo, 1903), kies konsiston kaj selekton prizorgis Zamehof mem..

La 12an de julio 2011 en Odesa Instituto de vitkulturado kaj vinfarado "V. Je. Tairov" estis solene inaŭgurita

memortabulo al V. A. Gernet kun la teksto en du lingvoj, la rusa kaj Esperanto:

VLADIMIR ALEKSANDROVICH GERNET (1870-1929)
 UNUA GVIDANTO DE VINOLOGIA STACIO DE RUSIAJ VINBERISTOJ
 KAJ VINFARISTOJ (1910-1921)
 HONORA CIVITANO DE ODESSA
 FONDINTO DE UNUA ODESA ESPERANTO-KLUBO (1894)
 PIONIRO DE ESPERANTA MOVADO



La memortabulo kun bareliefo de V. Gernet estis kreita de juna odesa skulptisto Maksim Babkin. La kreon kaj instalon de la memortabulo al fama odesano, organizinto de E-movado en Odessa kaj unu el pioniroj de tutmonda Esperanto-movado, iniciatis odesa junulara Esperanto-klubo “Verdaĵo”.

Ivan Mitrofanoviĉ Lucenko (1863-1919). Medicina doktoro, homeopato. En 1889 malfermis en Odessa homeopatian apotekon kaj malsanulejon. La malsanulejo estis moderpreza por ĉiuj, sed malriĉuloj povis uzi ĝiajn servojn senpage. En 1911 I. M. Lucenko estis ano de odesa societo “Esperanto”, sekretario de Hanemana (homeopatia) societo kaj estro de Ukraina klubo.



Odo Bujwid (1857-1942). Pola esperantisto; en 1893 estro de Odesa



bakteriologia laboratorio;

И. М. Луценко

poste katedrestro de katedro pri higieno de Jagellona Universitato (Uniwersytet Jagielloński, Universitas Jagellonica Cracoviensis) en Krakovo; en 1904-1905 – dekanato de tiea medicina fakultato. Aŭtoro de medicina literaturo en Esperanto. En 1912 prezidanto de organiza komitato de VIII Universala Kongreso de Esperanto en Krakovo; en 1931 - prezidanto de organiza komitato de XXIII Universala Kongreso de Esperanto en Krakovo.

О. Буйвид

Digna daŭriganto da la afero de Esperanto en Odessa post la Oktobra revolucio de 1917 fariĝis Literatur-Scienca Rondo (LSR, 1922-1936). Ni nomu kelkajn plej konatajn ĝiajn anojn.

Sergej Grigorjeviĉ Rublov (1901-1979). Kemiisto, inventisto. En 1924 diplomiĝis de Odesa Universitato kaj instrus tie ĝis 1929. Unu el la plej kompetentaj uzantoj de Esperanto, ano de “Lingva Komitato” (antaŭulo de la nuna Akademio de Esperanto), aŭtoro de kelkaj vortaroj kaj teoriaj studoj, inter kiuj unika “Struktura vortaro de Esperanto”. Tradukis du natursciencajn librojn de geologo akademiano A. E. Fersman: “La kemio de l’ universo” (SAT, Parizo, 1925) kaj “La vojo al scienco de estonto” (Lepsiko, 1928).



Kolektoj de fabloj de I. A. Krilov en tradukoj de Rublov estis eldonitaj dufoje: en Hungario (“111 fabloj”, HEA, Budapest, 1979) kaj en la fama eldonejo de Juan Régulo Pérez (“Elektitaj fabloj”, TK/Stafeto, 1979). En 2002 en la rusa urbo Jaroslavl estis eldonita ampleksa verkaro de Rublov: tradukoj de versa romano “Eŭgeno Onegin”, fragmentoj el teatraĵo “Boriso Godunov”, tri el la kvar “Malgrandaj tragedioj”, kvar grandaj poemoj, tri fabeloj kaj pli ol cento da versaĵoj – ĉio el la verko de A. S. Puŝkin. En 2019 samloke aperis dua volumo de tradukoj de S. G. Rublov – verkoj de rusaj poetoj de XVIII-XIX jc. Oni planas eldoni ankaŭ la trian volumon, enhavantan tradukojn el poezio de sovetia periodo.

Evgenij Davidoviĉ Ajsberg (1905-1980). Inĝeniero-radioteknikisto, unu el la plej elstaraj fakuloj pri radio de sia tempo. En 1925 translokiĝis al Parizo kaj komencis eldonadi (kun Pierre Corret) gazeton “Internacia Radio-Revuo” en Esperanto, fondis Francan Asocion de televido; estis direktoro de franca filio de Internacia Instituto de radio. Unu el fondintoj de Internacia Asocio de eldonantoj de periodaĵoj pri radiotekniko (UIPRE). Lia libro “Fine mi komprenis la radion” (Parizo, 1934) estis originale verkita en Esperanto, kaj poste tradukita al 13 lingvoj. Entute verkis kvin sciencopopularigajn librojn pri radio kaj televido, tradukitajn sume al 20 lingvoj.

Kune kun V. V. Vozdviĵenskij, Ajsberg instruis en Superaj pedagogiaj Esperanto-kursoj en Odesa, kies direktoro estis profesoro Ŝahnoviĉ. Poste surbaze de tiuj Kursoj estis fondita Odesa instituto de fremdaj lingvoj, kun la fluo de l’ tempo transformita al Fakultato de latinidaj kaj ĝermanidaj lingvoj de Odesa Universitato.

Do, Esperanto havas brilan historion en Odesa Universitato. Bedaŭrinde, en la nunaj kondiĉoj nenia ŝanco de estonto por ĝi restas...



Е. Д. Айсберг

Do, Esperanto havas brilan historion en Odesa Universitato. Bedaŭrinde, en la nunaj kondiĉoj nenia ŝanco de estonto por ĝi restas...

Polisinteza

Aleksandro Mitin

Mi eksciis la vorton “Vivuo”.
Vidu, kia strukturo freneza!
Ĉu laŭ iu eskima influo
Nia lingv’ estas polisinteza?

Sed ne gravas saĝula respondo.
Mi proponas, por nepoj nin benu,
Ne paroli plu “Pacon al mondo”
Ĉiuj diru nun: “Paco mond-en-u!”

Tuj nin P. Mikael’ akompanos,
Eksurtablos skribil’ kaj kajero.
Eĉ se tiam la kap’ re-sen-planos —
Ĉiam en-poet-koras espero!

Kaj, estante sub nova impresio
Al Soroka ni kanton dediĉos,
En la buso, post fin’ de l’ kongreso
Kantos laŭte, ke “Ni enmoskviĝos”.

Ne hezitu ni: mia propono
Esperanton ne faros komplika.
Tion pruvos, ekzemple, Brunŝtono:
Ĝi nur iĝos pli senĉapeliga,

La homar’ multjarmile admiru
Tian lingvon. Finvenko sukcesos.

Ekmorgaŭas. Tuj mi por-dorm-iru!
Tut-maten-labor-povi necesos.

20-28.06.2020

CERBE kaj KORE

n-ro 16 (84), septembro 2020

Kultura suplemento al la revuo “Ponto” n-ro 115

[eksa Bulteno de REU (BdR)]

“Ponto” estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo “Rusia Esperantista Unio

***Oni rajtas uzi kaj represi ĉiujn materialojn de la eldono nur kondiĉe de
ĝusta indiko de la fonto***

CkK atendas viajn prozajn, poeziajn, interlingvistikajn, instru-metodikajn kaj scienc-
popularajn kontribuojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov nikolao@yandex.ru .

Estraro de Rusia Esperantista Unio

Redaktofino 24.09.2020